

---

# TAMEN PLU!

---

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO - SEPTEMBRO 2005 / JARKOLEKTO 24

Redaktado: Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park SA 5019 - [esperantobob@iprimus.com.au](mailto:esperantobob@iprimus.com.au)

Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en SudaŬstralio: <http://sa.esperanto.org.au>

---

**Bonestu ne forgesi de tempo al tempo  
atente rigardi la konstante ĝisdatigatan  
retejon de la 21a Somerkursaro de AEA:  
<http://aesk.esperanto.org.au/>**

Lerta flamenkisto dancis tiom belege, ke belegulino alĵetis al li ruĝan rozon. Post la dancprezentado ŝi iris postkulisen kaj demandis lin, kion li faros per la rozo.

“Mi metos ĝin en glason da akvo apud mia lito,” li respondis.

“Ne, bonestu ne fari tion, ruĝajn rozojn oni devas meti inter siajn dentojn!”

“Precize tie ĝi estos”, respondis la maljuna dancisto.”

---

## Edukado

Se vi vere volas lerni kiel senerare uzi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: ”Lingvaj Resondoj”.

La ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$22,00.

“Diras edzo al sia edzino:

“Mi tute ne komprenas, kiel vi povas esti tiom belega kaj samtempe tiom stulta.”

Respondas edzino al sia edzo:

“Dio igis min bela por ke vi amu min, kaj stulta por ke mi amu vin.”

---

## Gravaj Esperanto-eventoj

Merkredon la 7an de septembro ni kunvenos en la Komunumejo, 72-74 East Avenue, Clarence Park, ĉe la angulo de East Avenue kaj Canterbury Terrace, Black Forest, 5035, tuj apud la stacidomo, Clarence Park.

Merkredon la 21an de septembro ni kunvenos en la Komunumejo, 72-74 Orienta Avenuo, Parko Clarence, ĉe la angulo de Orienta Avenuo kaj Canterbury Teraso, Nigra Arbaro, 5035, tuj apud la stacidomo, Parko Clarence.

Sabaton la 24an de septembro ni okazigos ekskurson al Haveno Viktoro. Detaloj sekvos! Sabaton la 22an de oktobro ni renkontiĝos je la 12a horo en la Komunuma Ĝardeno de Gloria en Wynn Vale.

Dimanĉon la 13an de novembro ni renkontiĝos ĉe Sandor kaj Helena por Amuzaĵoj kaj Ludoj.

La 7an de decembro ni festos la 146an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof en la bone, eĉ bonege konata komunumejo en Parko Clarence, la antaŭurbo kun multaj esperantistoj.

Ĝuu 13 tagojn da intensa studado de la internacia lingvo, Esperanto, dum la 21a Somerkursaro/kongreso de AEA. Travivu amikajn aktivecojn kaj Esperanto-kulturon plonĝante en la lingvon ekde la 15a ĝis la 27a de januaro 2006 en “Kianinny Cabins”, Tathra Road, Tathra, NSK 2550, ĉe la sudorienta marbordo de Novsudkimrujo.

La 91a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2006 en belega Florenco, Italujo.

Iun dimanĉon en la vespero dudek kvin rekrutoj revenis tro malfrue de la forpermeso, kaj tio estas laŭ militista pensmaniero afero tre serioza, ĉar militemuloj estas, kiel vi scias, tre seriozaj homoj. Unu post la alia ili aperis antaŭ la ĉioscia kolonelo.

“Jes,” diris la unua rekruto. “Mi estis en la arbaro kun mia edzino, kaj ni endormigis. Vekiginte mi sciis, ke mi malfruas, kaj mi rapidis al bieno, kie mi prunteprenis ĉevalon por rajdi al la stacidomo. Sed kelkajn kilometrojn antaŭ la stacidomo la ĉevalo falis morta sur la vojon, kaj mi maltrafis la vagonaron.”

Tiam eniras rekruto numero du. Li rakontas precize la saman historion. Same faras rekrutoj tri kaj kvar. Ŝajnas ke ĉiuj prunteprenis ĉevalon por rajdi al la stacidomo. Post kiam dudek kvar rekrutoj estas rakontintaj la saman historion envenas la lasta rekruto, li estis rekruto numero dudek kvin. Tre severe diras al li la kolonelo:

“Ankaŭ vi kompreneble estis en la arbaro, endormiĝis kaj vekigis tro malfrue, ĉu ne?”

“Jes, imagu tion, kiel vi jam scias pri tio?”

“Kaj vi prunteprenis ĉevalon, ĉu ne?”

“Ne, mi prunteprenis aŭtomobilon, kaj mi veturigis ĝin direkte al la stacidomo, sed subite mi ne plu povis pluen iri, ĉar kuŝis amaso da mortintaj ĉevaloj sur la vojo...”

## Biografio de Bob Felby



Bob naskiĝis la 11an de julio 1932 en la ĉefurbo de Danujo, Kopenhago. Li estis lernanto plejparte en la malfacilaj militaj jaroj

(1939–46) kaj eklaboris jam kiel 14-jara, unue en hufferfabriko.

Poste li estis ŝipkonstruisto, bakisto, malsanuleja laboristo, kokinbredisto kaj multo alia en dudeko da diversaj laborlokoj, ne nur en sia hejmlando, sed ankaŭ en Anglujo kaj Aŭstralio.

Pleje li ŝatis la noktogardistan postenon (1962–74, en Danujo). Pro sia pacamo kaj rifuzo militservi li pasigis la jarojn 1954–56 en

punlaborejo “Gribskov”, dorlote kromnomita “K.Z. Lager Gribbenwalde”.

De 1974 Bob vivas kun siaj edzino kaj tri gefiloj en Aŭstralio. Ili havas kvin

genepojn. Bob membras en Universala Esperanto-Asocio (UEA ekde 1951, Aŭstralio

Esperanto-Asocio (AEA ekde 1974, Esperanto en Sudaŭstralio ekde 1979, Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA),

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kaj li estas estrarano en “Rondo Kato”.

Krom tio li estas registrita Mondcivitano. Pro liaj meritoj AEA honoris Bob per titolo “Fratulo de Esperanto” en 2005.

Krom la gepatra dana kaj Esperanto li parolas angle kaj interkompreniĝas ankaŭ norvege, svede kaj germane.

### *Kiamaniere vi esperantistiĝis?*

Dum la okupacio de Danujo dum la dua mondmilito mi devige lernis la germanan.

Kvankam tre plaĉis al mi lerni ion, kio povas alproksimigi min al aliaj homoj, mi ne sukcesis bone lerni tiun lingvon.

Kelkajn jarojn post la fino de la milito mia patro proponetis al mi lerni la internacian lingvon, Esperanto. Unue mi lernis ĝin el “Esperanto for ungdommen” (Esperanto por la junularo) de L. Friis. Poste mi trastudis alian libron de la sama verkinto, sed kun la helpo de tre bonkora instruistino el Jutlando, s-ino Graule.

Mi lernis iom pli per koresponda kurso. Tiam en la vesperlernejo instruis min rusa instruisto, Leonid Vasiljev. Li kaj mi fariĝis bonegaj amikoj. Poste li provis instrui al mi sian gepatran lingvon!

### *En kiuj Esperanto-aranĝoj vi prenis parton?*



Mi prenis parton en kelkaj somerkursaroj en Helsinoro, Danujo en 1952 kaj poste mi prenis parton ankaŭ en kelkaj danaj kongresoj, en Dan-

sveda Esperanto-tago, en kelkaj ekskursoj al Svedujo, en universalaj kongresoj en Kopenhago en 1956, en Tampereo en 1995, kaj en Adelajdo en 1997. Mi ĉeestis tre multajn aŭstraliajn kongresojn kaj somerkursarojn, kaj

---

preskaŭ ĉiujn kunvenojn aranĝitaj de “Esperanto en Sudaŭstralio”.

***Vi ne nur ĉeestis/-as, sed ankaŭ gvidas, kunorganizas, aranĝas, instruas, redaktas, skribas...***

Dum 1967-68 mi estis prezidanto de “Frederikssunda Esperanto-klubo” kaj samtempe redaktis ĝian membrogazeton “Frederikssundaj Frenezaĵoj”. Mi helpis prepari la Dan-svedan Esperanto-tagon en Frederikssund, Danujo. En Adelajdo mi estis sekretario, poste vicprezidanto, daŭre mi estas bibliotekisto (la libroj estas en mia hejma labor-ĉambro, dorlote kromnomita ‘la oficejo’), kaj redaktanto de nia cirkulaĵo “Tamen Plu”, kiun mi komencis iam en la 1980-aj jaroj. Mi prenis parton en ekskursoj, marŝoj, zamenhoffestoj, kaj AEA-kongreso en Adelajdo en 1982, UEA-kongreso en Adelajdo en 1997 kaj pluraj somerkursaroj kaj kongresoj adelajdaj. En 2005 AEA eldonis mian biografion titolita “Malgrava Historio pri Mia Vivo”.

***Kiu flanko de la Esperantomovado plej altiras vin?***

La retaj kontaktoj kaj turismo. Estas tiom da landoj en la mondo, kiujn mi ankoraŭ ne vidis..

***Ĉu vi havas krom Esperanton iun alian ŝatokupon?***



Jes, muziko tre ĝojigas min. Kiel 14-jara mi jam ludis en mandolinorkestro en Kopenhago. Mi ludis la duan mandolinon, poste ankaŭ gitaron, eĉ havajan gitaron. Plej amuze estis ludi la rusan t.n. “subkontrabasbalalajkon”.

Nuntempe mi havas du mandolinbanĝojn, unu mandolinon, unu ukulelon, unu akordionon, kaj unu balalajkon. Mankas al mi nur ke mi lernu bone ludi ilin!

***Kiuj estas viaj grandaj revoj?***



Mian tutan vivon mi revis pri tutmonda ĉiamdaŭra paco, sed evidente la mondgvidantoj havas aliajn

ambiciojn. Plaĉus al mi se estus nur unu registaro en la mondo, kondiĉe ke ĝi zorgu ankaŭ pri ĉiuj el ni, kaj ne nur pri si mem.!

***Se vi volas scii pli pri Bob, nepre legu lian biografion. Ĝi estas traplektita per la speciala hom- kaj bestoamo de Bob, per liaj humuraj anekdotoj, sentoj kaj multegaj spertoj. Vi ekscios pri lia rilato al la nobelpremiito R. Selten, pri la serĉado de vero en la Kriŝnomovado, pri la Esperanto-instruado en la puntendaro kaj pri multo pli.***

Katja Steele

Veturas geedzoj kelkajn mejlojn laŭ malurba ŝoseo. Neniu el ili diras ion, ĉar hejme ili kverelis, eĉ kverelegis, kaj nun ili malamas unu la alian!

Pasante preter kelkaj muloj, gekaproj kaj geporkoj, la edzo demandas sarkasme: “Ĉu parencoj de vi?”

“Jes,” respondas la edzino, “boparencoj!”

---

## Spiritisma

### Esperanto-Informilo

Nuntempe SEI disponeblas ankaŭ interrete. Eblas nun ĉie en la mondo legi kaj presi ĝin. La paĝo, kiu prezentas iom el la historio de la bulteno, redaktatas en la portugala, angla kaj hispana, kaj baldaŭ ankaŭ en nia belega lingvo, Esperanto.

La adreso estas: <http://www.lfc.org.br/sei>

“Estas dismaŝiĝo sur via dekstra ŝtrumpo”, diris patro al sia filino reveninta el sia vespera promenado.

“Jes, tiaj aferoj okazas”, respondis la knabino.

“Jes,” respondis la patro, “sed kiam vi eliris ĝi estis sur via maldekstra kruro!”

---

## Nova Estraro de TEJO elektita en Zakopano

La nova prezidanto de TEJO estas Henning Welde Thorbjørnsen. Valentina Sodorova estis elektita ĝenerala sekretario, Katja Ignatieva reelektiĝis kasisto. La ceteraj estraranoj estas Francois Hounsounou, li respondecas pri

---

Landa kaj Afrika Agadoj, Chuck Smith pri informado, Haris Subasc pri eksteraj rilatoj kaj David-Emil Wickström pri kongresoj kaj aktivula trejnado. La komitato de TEJO akceptis ankaŭ VEJO-n (Vjetnaman Esperantistan Junularan Organizaĵon) kiel la 44an Landan Sekcion de TEJO. Legu pli en Libera Folio!: <http://www.lierafofolio.org>

“Franca grafo estis ekzekutota. Ĉar li estas la centa, kiun oni ekzekutas tiun tagon, la ekzekutisto diris al li:

“Vi rajtas elekti kian hakilon mi uzu, ĉu malakran, akran aŭ ĉu tre akregan glavon?”

“Akregan” respondis la grafo.

“Cu vi preferas genufleksi aŭ resti staranta sur viaj piedoj?” demandis la ekzekutisto.

“Mi preferas resti staranta”, diris la brava grafo.

Tie li staris, la grafo. La glavo faris sian devon, sed la grafo nur staris tie.

“Okazis ja nenio”, li diris al la ekzekutisto.

“Ĉu ne”, respondis tiu, “provu skui vian kapon!”

---

## Muzikume

Internacia Televido invitas ĉiujn artistojn, kiuj muzikumas en Esperanto, kontakti la televidkanalon por la kreado de muzikvideoj kaj la difino de agendo por la registrado de intervjuoj kaj koncertoj kun la Esperanto-artistoj kadre de la programo “Muzikume”, kies vinjeton eblas vidi nun en la portalo ‘Ĝangalo’: <http://ghangalo.com>

---

## Patro Josef Stempf (1830–1896)

En la revuo ‘Heimat Allgäu’ (Hejmlando Algovujo) ĵus aperies artikolo ‘Forgesitaj planlingvoj el Algovujo’ (20.2005: 1, paĝoj 15 ĝis 18). Ĝi prezentas biografian resumon pri Josef Stempf, katolika pastro, kritikinto de Volapük kaj verkinto de du forgesitaj planlingvoj ‘Myrana’ kaj ‘Communia’. La artikolon ornamas la portreto de Stempf kaj la titolpaĝo de sep verkoj, el kiuj du rilatas al la (ankoraŭ ne plene esplorita) politika aktiveco

de Stempf kaj la atakoj de la Centro-Partio kontraŭ li. Adreso de la redaktejo: Heimatbund Allgäu e.V., Westendstr. 21, D-87439 Kempten, Germanujo.

---

## Cent Jaroj da Komunikado

La 9an de aŭgusto 2005 en ‘Kaliningradskaja Pravda’, la plej legata ĵurnalo en Kaliningrado, aperis informartikolo de Irina Klimovic ‘Sto let obŝĉenija’ (cent jaroj da komunikado) pri la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. La artikolon garnas fotoĵo de kaliningrada kantistino Irina Striĵnjoŭa, kiu prezentis kanton en Esperanto en la Internacia Arta Vespero. Ĝi estas la tria priesperanta artikolo, kiun Irina Klimovic aperigis ĉijare en ‘Kaliningradskaja Pravda’.

---

## Sesdek jarojn post la unuaj atombomboj

En Italujo, Asocio “Beati I costruttori di pace” (Feliĉaj estu la Packonstruantoj), en ligo kun aliaj eventoj en la mondo, memorigis la 60an datrevenon per pluraj iniciativoj en Milano, Ghedi, Padovo kaj Aviano. Entute elstaris du eventoj; sabaton la 6an de aŭgusto je la 8.15a horo, momento da silento kaj pripensado pri la atombombo detruinta Hiroŝimon, anta la arma flughaveno en Ghedi (Brescia), kie estas staplitaj 40 nukleaj armiloj B-61; la kunveno ‘For la atomarmilojn’ okazinta en Padovo la 8an de aŭgusto kun gravaj raportoj de sciencistoj, parlamentanoj kaj aliaj aŭtoritatuloj.

Ĉiuj eventoj okazis kadre de la “Kampanjo Tutmonda por Forigo de Nukleaj Armiloj”, kiun iniciatis la urbestro de Hiroŝimo, AKIBA Yadatoshi. ESF – Esperanto Sociala Forumo, sukcesis havigi al la kunveno lian specialan mesaĝon, en kiu evidentiĝas la agadoj de la urboj Hiroŝimo kaj Nagasako por forigo de nukleaj armiloj, kune kun pluraj NGO kaj kun la Monda Konferenco de Urbestroj por Paco, al kiu aliĝis pli ol 1000 urboj en la mondo. Por trasendi la mesaĝon apartan rolon ludis la internacia lingvo, Esperanto.

Fakte la japanaj amikoj uzis kiel pontolingvon Esperanton, tre oportuna en ĉi tiu kazo.